

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

NIAJ PLANOJ

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas kursoj kaj regulaj kunvenoj.

FOIRO DE URBANAJ AGADOJ

mar. 10 (sab) 10h00-16h00 ĉambro 306

Ĉe nia regula kunveno, okazas multaj agadoj de diversaj kulturaj kaj edukaj grupoj, inkluzive de nia Esperanta grupo. En tiu ĉi tago, ni ekspozicios pri Esperanto, la lingvo 125-jara. Ĉiujare tia agado okazas, sed antaŭ unu jaro, ĝi ne okazis pro la postefiko post la granda tertremo.

HAMA-RONDA VESPERO

marto

mar. 17 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 708

Retrospektive pri esperantaj jubileuloj --- (1) Kolomano KALOCSAY (1891-1976), do lastajare 120 jarojn de la naskiĝo, (2) Tibor SEKELJ (1912-

1998), do ĉi-jare 100 jarojn de naskiĝo, (3) HASEGAWA Teru, konata kiel Verda Majo (1912-1947) --- pri tiuj figuroj oni komentarios.

aprilo

apr.21 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 306

Pri Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kaj ties lingva ekzamenado laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro, estos klarigita de s-ino ISIKAWA Tieko, estro pri eduka fako de Japana Esperanto-Instituto.

RUDIMENTA KURSO

Ni havos kurson, ĉiusabate de la 21a de apr. ĝis la 21a de julio, 13 fojojn (krom la 5a de majo). Kotizo: 6000 enoj.

TIEL OKAZIS LA KLASOJ

Ĉe la regula kunveno ĉiusemajne okazis jenaj klasoj.

tago	klaso	#	gvidanto	lernolibro / legata libro ktp
sabato	meza 1	4	HIROSE Kanae	"Nova Esperanta Krestomatio"
	meza 2	5	DOI Ĉieko	"Tra Dezerto kaj Praarbaro"
	meza 3	4	DOI Hirokaz	"Vivo de Lanti"
	Jokohama Salono	8	(sen aparta gvidanto)	1a kaj 3a semajno de monato: "Vojaĝo en Esperanto-Lando"
				2a semajno de monato: verkado de eseo
				4a semajno de monato: komuna tradukado el la japana
merkredo	merkreda	5	DOI Ĉieko	"Silento"

= maksimuma nombro de klasanoj lastatempe, inkluzive de la gvidanto



■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti

■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458

■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

TIEL OKAZIS LA PRELEGO

De S-ro ALEX HUMET al la rondanoj

feb. 11 (sab) 15h00-17h00 ĉambro 603
prelegis: s-ro Alex HUMET, kataluno loĝanta en Belgio
resume interpretis: s-ro SIBAYAMA Zyun'iti
ĉeestis 23, inkluzive de la preleginto

S-ro Alex vojaĝas pli ol 3 semajnojn en Japanio, tranoktante ĉe esperantistaj hejmoj, kaj lia unua vizito estis nia Jokohamo. Li turismis tra Kamakura kaj Jokohamo en la 10a de feb., kaj havis prelegkunsidon ĉe ni, kun la temo "La Valoro de Esperanto". Li parolis pri siaj gravaj



vivomarkoj: nome konatiĝo kun Esperanto en studentaj jaroj, unua partopreno en la Internacia Junulara Kongreso, konatiĝo kun knabino de denaske esperanta familio --- kiu nun estas la edzino, gvidanteco, prezidanto en Flandra Esperanto-Ligo, kaj konatiĝo kun la saniga metodo de Bruno Groening.

De S-ro SUZUKI KEIICHIRO al la urbanoj

en la 1-a konferenca ĉambro en la kunvenejo de "JICA Yokohama"

feb. 12 (dim) 13h00-13h50
ĉeestis 23, inkluzive de niaj rondanoj

Okaze de la prelegaro malfermita al la civitanoj en Jokohamo, s-ro Suzuki Keiichi-roo parolis japanlingve: "Diversaj internaciaj agadoj per Esperanto". Li unue skizis la lingvan flankon de Esperanto, kaj poste, uzante multajn fotojn, skizis internaciajn kontaktojn per Esperanto. En la prelego estis menciita la DVD pri Jokohamo (vidu suban artikolon), kaj oni ricevis broŝuron kun la eĥo el la ricevintoj de la DVD.

RAPORTO

Eldoniĝis DVD "Simboloj por restarigo de Jokohamo – Instalaĵoj konstruitaj en 1930"

Lastjare Jokohama Esperanto-Rondo eldonis Esperantan version de DVD (Diĝita Variuza Disko) "Simboloj por restarigo de Jokohamo – Instalaĵoj konstruitaj en 1930" kaj du libretojn: "teksto de la DVD" kaj "La Granda Tertremo en la Orienta Parto de Japanio kaj nia vivo poste".

La afero komenciĝis en 2010. Tiam japana eksĵurnalisto Ĉiba Takaŝi eldonis la DVD-n por prezenti reviviĝon de Jokohamo post la katastrofo de la Granda Tertremo en Kantoo, kiu okazis en 1923.

Se temas pri la tertremo, oni tuj pensas grandan damaĝon en Tokio. La damaĝo en Tokio estis ja grandega, detruigis multaj domoj pro la tertremo,

sed plej granda damaĝo en Tokio okazis pro fajrego post la tertremo: homoj en tiel dense loĝata urbego ne povis trovi fuĝejon de la fajrego, kaj do multege da homoj pereis pro fajrego. Dume Jokohamo troviĝas pli proksime de la sismocentro, kaj do la damaĝo de konstruaĵoj pro la tertremo estis pli grandega ol en Tokio. Jokohamo tamen reviviĝis de tia katastrofo kaj plejparto de la restarigaj laboroj finiĝis 7 jarojn poste, en 1930.

S-ro Ĉiba Takaŝi, kiu jam eksiĝis de sia profesia laboro kiel ĵurnalisto, planis fari DVD-n pri la restarigo de Jokohamo okaze de la jaro 2010, t.e. paso de 80 jaroj post la restarigo. Li kolektis

materialojn utiligante sian povon kiel eksa ĵurnalisto kaj akirinte kunlaboron de la amatora fotisto ktp. Post elfaro de japanlingva DVD li planis internacie diskonigi la aferon, sed ne sukcesis fari anglalingvan version. Li petis min, ĉu ne estas ebleco esperantigi la diskon, ĉar li konis min kiel esperantiston dum sia profesia aktivado. Mi tuj akceptis la laboron, kaj komencis fari en miaj liberaj horoj.

Intertempe, la 11an de marto 2011 okazis la Granda Tertremo en la Orienta Parto de Japanio. Post interkonsiliĝo kun mi, s-ro Ĉiba aldonis mallongan antaŭparolon al la DVD, ĉar li mem devenis de la distrikto, kie okazis la tertremo kaj lia hejmloka domo estis detruita. Irinte la lokon li rigardis la aferon kaj fotis multe. Do la Esperanta versio de la DVD fariĝis iom alia ol tiu de la origino japanlingva.

Mi volis sendi la DVD-n kun Esperanta teksto al eksterlandaj esperantistoj. El la reta jarlibro de UEA mi prenis adresojn de landaj asocioj, kaj aldonis adresojn de legantoj de nia gazeto "Novaĵoj Tamtamas" kaj de aliaj kelkaj konatoj. Antaŭ la sendado mi faris alian libreton pri la ĵus okazinta tertremo. Verdire aferoj, kiujn oni volas ĝuste nun ekscii, estas okazintaĵoj en Japanio post la lasta tertremo. Kvankam mia skribaĵo pri tio estas ne sufiĉa, tamen tio iel helpas.

Mi do sendis la DVD-n kaj du libretojn al 114 esperantistoj en 94 landoj.

Venis respondoj eĉ de la sendaĵoj.

Ni planas denove eldoni libreton pri la eĥoj. Ni faris provizoran libreton kun la jam venintaj eĥoj. Se vi ankoraŭ ne sendas mesaĝon al ni, bonvolu skribi al ni laŭeble frue. Doi Ĉieko <doi-cik@seapple.icc.ne.jp>

Eĥoj al la DVD venis el 19 landoj, kiel ĉi-sube montrite

- *Aŭstralio: Franciska Toubale (la teamo en la radio 3ZZZ)
- *Aŭstrio: Uwe Stecher (Aŭstria Esperanto-Federacio)

- *Ĉeĥio 1: Josef kaj Milada Kriz (Ĉeĥa Esperanto-Asocio)
- *Ĉeĥio 2: Karel Kraft
- *Ĉinio: Wang Minhao (Ŝanhaja Esperanto-Asocio)
- *Estonio: Halja Vures (sekretario de Esperanto-Asocio de Estonio)
- *Francio: Andrea (CERL [Centre Espéranto de la Région Lyonnaise])
- *Germanio 1: Heinz Heimann
- *Germanio 2: Yoshie Kleemann
- *Islando: Hannes Högni Vilhjálmsón (Prezidanto de IEA [Islanda Esperanto-Asocio])
- *Komoraj Insuloj: Ali Mze Mihidjahi (Komora Esperanto-Asocio)
- *Kostariko: Guido Hernandez (Kostarika Esperanto-Asocio)
- *Luksenburgio: Albert Wickler (Luksemburga Esperanto-Asocio)
- *Malto: Carmel Mallia (prezidanto de Malta Esperanto-Societo).
- *Mongolio: Enkhee (Mongola Esperanto-Societo)
- *Nepalo: Rajendra Manandhar
- *Niĝero: Boukari Illiassou (Niĝerlanda Esperanto-Klubo)
- *Svisio: Mireille Grosjean
- *Taĝikio: Firdaŭs Ŝukurov (Asocio de Esperantistoj de Taĝikio)
- *Ukrainio 1: Volodimir Hordijenko (Prezidanto de UkrEA [Ukrainia Esperanto-Asocio])
- *Ukrainio 2: Tamara Popova
- *Uzbekio: Anatoli Ionesov (Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro)



spektado de la DVD en Ŝanhajo

ESEO



Matena promonado laŭ la marbordo

AIDA Yayoi

La plenplena luno ankoraŭ restis en la okcidenta ĉielo sekvate de unu stelo. — Bonan matenon, kara luno! Kia ĝojo renkonti vin denove! Hieraŭvespere vi glacie lumiĝis en la orienta ĉielo, sed nun ŝajne perdis iom da energio pro via tutnokta vojaĝo. Endormu, vi milda luno, sonĝu pace. Baldaŭ aperos la suno kaj kolorigos la ĉielon per matenruĝo, kaj plenumos sian taskon anstataŭ vi.

Mi kaj mia edzo atingis la plaĝon. Videblis kelkaj figuroj jam promenantaj, iuj kun hundo. Sabla plaĝo estis malpli vasta kaj malpli facila por paŝi ĉi-matene. Sur la plaĝo nenia fenomeno estas sama tage kaj momente. Ŝanĝiĝas vasteco de marbordo, firmeco de subpieda sablo, alteco de ondoj resonantaj dolĉe aŭ kolere, kaj konkaĵoj portitaj el la maro.

El tiuj diversaj facetoj ĉe marbordo la plej granda fascinaĵo estas la fora pejzaĝo de la maro kaj montoj. Reliefigis laŭ sunleviĝo pli kaj pli klare la longa duoninsulo Izu kaj la insuleto Enoŝima kun ankoraŭ brilanta lumturo, kaj la plej sopirata figuro de la Monto Huĝi en helruĝa ŝtofo de nuboj. Tio estis mirinde bela.

Min envolvis feliĉo. Marŝado certe estas utila por bonsano kaj renkontoj kun geamikoj estas agrablaj, sed sen tiu kortuŝa pejzaĝo mi dubas ĉu la matena promonado daŭros longe.

Promenante mi ofte rememoras la unuafojan renkontiĝon kun s-ino Barbara Pietrzak. Kiam mi prelegis en la Japana Kongreso en Kameoka en 2003 sub la titolo, “Ĝojo kaj doloro! Kio estas traduko?”, s-ino Barbara aŭskultis ĝin kaj poste intervjuis min pri la enhavo. Mi ne povis paroli bone, sed per ŝia profesia lerteco kaj konduko mi pli-malpli balbute esprimis min. Tio estis la komenco de nia amika interrilato, kvankam niaj renkontiĝoj fariĝis tre maloftaj. Mi tamen aŭskultas ŝian voĉon elsenditan de Pola Retradio kun admiro al ŝia sindediĉo al Esperanto.

Kial mi rememoris s-inon Barbara? Ĉar tiama parol-temo en la kongreso rilatis kun la libro “Donaco el la Maro” verkita de Anne Morrow-Lindbergh. En la libro aperis diversaj konkaĵoj trovitaj marborde dum ŝia promonado. Ankaŭ mi ofte kolektis konkaĵojn, kaj tiam en mian memoron revenis la afabla rideto de kara s-ino Barbara Pietrzak.



Saluton el SIBAYAMA Zyun'iti, la nove nomumita redaktanto de tiu ĉi “Novaĵoj Tamtamas”. Sub la ĝenerala gvido de la prezidanto, s-ro DOI Hirokaz kaj la estro de la Organa Fako, s-ino MIYAZAKI Hideko, mi redaktos. La enpaĝigon daŭre faras s-ino SIBAYAMA Noriko. De la lasta numero, la titolpaĝo de tiu ĉi organo havas japanlingvan skribon super la titolo. Ĝi signifas “Esperanto-lingvan organon de “Jokohama Esperanto-Rondo”, por konigi la sencon i.a. al la oficialuloj kiuj kune kun la japanlingva organo ricevas tiun ĉi.

Vian kontribuon al la gazeto mi petas!

**Redaktanto
salutas**



SZ